

II

Tarda Pentofaro

Denove ni transis *cañon*-ojn, en kies profundaĵoj ni rajdadis kelkan temp-on. Sed poste tiu rajde malfacila pejzaĝo estis malantaŭ ni almenaŭ por tiu tago. Estis herbkovrata ebenaĵo, trans kiu ni trotadis horlonge, kaj el kiu leviĝis unuopaj montoj. Ĝis tiam la spuroj de la ĉimaroj ĉiam estis antaŭ la hufoj de niaj ĉevaloj.

Ĉirkaŭ la tagmezo la *gambusino* Sandia haltigis nin, kaj diris kontente:

„Ĉi tie ni forlasu la spuron. Harton agis laŭ mia konsilo kaj faris kromvojon. Sed ni flankeniĝos dekstren, kie estas la rekta vojo.“

„*Well*, do ni flankeniĝu al Via direkto!“ la *scout* kapjesis.

En la nordokzidento, al kiu ni rajdis post mallonga paŭzo, amasiĝis bluecaj altaĵoj je la rando de la horizonto. La *gambusino* deklaris, ke estis montoj. Sed ili estis tiel malproksime for, ke ni rimarkis nur post pli longa tempo, ke ni proksimiĝis al ili. Je la posttagmezo ni denove mallonge paŭzis, tiam ni plurajdis per renovigita rapideco. Finfine ni vidis la unuan malabundan arbedon. Baldaŭ ni trovis pli da arbedaĵoj, kaj tie ni rajdis trans verdaj prerioj, kie ni devis rajdi ĉirkaŭ arbedaj insuloj ie kaj tie. Ni ekfartis multe pli bone. Sed vere admirinde kondukis niaj ĉevaloj. Tiuj fakte estis multe pli alispecaj bestoj ol tiuj, kiujn Don Atanasio estis donintaj al ni. Ili trotis tiel freŝe, kvazaŭ ili ĵus venis de la paŝtejo.

La montoj intertempe estis pli proksimiĝintaj. Ankaŭ vere estis je la ĝusta tempo, ĉar la suno jam malleviĝis al iliaj pintoj. Tiam ni ekvidis la unuan arbon. Ĝi staris meze sur la prerio, kun tempestotaŭzitaĵoj branĉoj. Ni salutis lin kiel antaŭulo de la sopirinta arbaro. Iam dekstre, tiam maldekstre, foje antaŭe ni rimarkis aliajn, kiuj staris tie ĉi pli proksime al la alia, tie pli malproksime, kaj finfine kuniĝis al maldensa arbareto, kies

tero malkrute leviĝis kaj kondukis nin al altaĵo, de kie subite faŭkiĝis ne tro profunda valo. Ni devis malsupreniĝi pro trai ĝin. Nun la tero leviĝis pli kaj pli al konsiderinda altaĵo. Ĝi estis nuda kaj senkreskaĵa, kaj sur ĝia dorso nur estis verda arbara rando. Laŭ tiu vastlonga dorso ni nun rajdadis sub arboj, kaj tiam malsupren en krutan profund-aĵon. Tie ni venis tra kanjono sur malgrandan senarban kaj herbokreskitan altaĵan ebenon. Apenaŭ ke niaj ĉevaloj estis ekpaŝintaj sur ĝi per iliaj hufoj, ni vidis strekon, kiu iris diagonale al nia direkto tra la herbaro.

„Spuro!“ la gambusino vokis. „Kiu nu povus esti rajdinta tie ĉi?“

Sandia deĉevaliĝis pro ekzameni la spuron.

„M'povas ĝin vidi sen deĝi“, Old Death grumbliis. „Tian spuron povas fari nur trupo, en kiu estas pli ol kvardek rajdintoj. Ni venas tro tarde.“

„Ĉu Vi vere opinias, ke estis la ĉimaroj?“

„Jes, tion mi opinias, *Sir!*“

Winnetou nun ankaŭ deĉevaliĝis. Li paŝis laŭ la spuron kelkan distancon, kaj tiam raportis:

„Dek palvizaĝoj kaj kvarope tiom da ruĝuloj. Ekde ili rajdis tie ĉi, pasiĝis la tempo de unu horo.“

„Nu, kion Vi diris pri tio, Don Tadeo?“ Old Death demandis.

„Se tio vere estas la kazo, ni tamen povas esti pli rapide ol ili“, la demandito respondis. „Ĉiukaze ili eliros pro esplorado antaŭ la atako. Tio daŭros tempon.“

„Ili devigis Harton:on priskribi al ili ĉion, tiel ke ne necesus al ili malŝpari tempon per longa serĉado.“

„Sed indianoj ĝenerale atakas antaŭ la matena krepusko.“

„Restu for de mi kun Via matena krepusko! Vi ja scias mem, ke inter ili estas blankuloj! Ili diable ne pene zorgos pri la kutimoj de la ruĝuloj. Mi volas veti, ke ili eĉ iros en la *bonanza*:n je la luma tago. Do faru, ke ni antaŭiĝas!“

Nun oni ekuzis la spronojn, kaj ni rapidrajdis trans la ebenaĵo, certe en tute alian direkton kien la ĉimaroj estis rajdintaj. Harton ne estis kondukinta ilin al la eniro de la *bonanza*, sed estis klopodinta irigi ilin al la plej malantaŭa eĝo de la valo. Ni kontraŭe provis atingi la eniron laŭeble rapide. Bedaŭrinde nun komencis la malheliĝo per tre granda rapideco. Ankoraŭ sur la ebenaĵo agrablis. Sed ni venis denove en arbaron, rajdis sub la arboj sur tute nevojigita tero, foje supren, foje reen malsupren, kaj devis finfine fidi nur pri la antaŭiranta *gambusino* kaj la okuloj de niaj ĉevaloj. La branĉoj kaj branĉetoj baris nian vojon. Ili batiĝis en niajn vizaĝojn, kaj facile povis ekfaligi nin de la ĉevalo. Tial ni ankaŭ deĉevaliĝis kaj iris piede, kondukante la ĉevalojn malantaŭ ni, tenante la pafpretajn revolverojn en la manoj; ĉar ni devis ekspekti ek trovi la malamikojn ĉiun momenton. Fine ni aŭdis akvon lirlī.

„Ni estas ĉe la eniro“, la *gambusino* flustris.

„Atentiĝu! Dekstre estas la akvo. Iru unuope, kaj teniĝu maldekstre laŭ la roko!“

„Nu bone!“ Old Death diris. „Do neniu gardisto staras tie ĉi, ĉu?“

„Nun ankoraŭ ne. Ne jam estas dormotempo.“

„Bela mastrumado, tio! Kaj eĉ en *bonanza!* Kie nun estas la vojo? Estas malhelege.“

„Ĉiam rekte antaŭen. La tero ebenas. Ne estos baro plu, ĝis ni atingos la tendejon.“

En la malhelo ni nur vidis, ke antaŭ ni estis libera valbazo. Maldekstre leviĝis sinistraj amasaĵoj alte supren. Tio estis la montomuro. Dekstre muĝetis la akvo. Tiel ni pluiris, la ĉevalojn ankoraŭ tirante per la kondukiloj. Mi paŝis antaŭe kun Old Death kaj Tadeo Sandia. Tiam Winnetou, kiu iris rekte malantaŭ ni, atentigis nin pri silueto, kiu ŝajnis rapide kaŝiri jen kaj reen inter la rokoj kiel hundo. Ni ĉesiris kaj aŭskultis. Nenio aŭdeblis.

„La malhelo trompas“, la *gambusino* diris. „Cetere malantaŭ ni estas la loko, kie troviĝas la kaŝita supreniro.“

„Do tiu io povas esti veninta de tie“, mi diris.

„Tiukaze la renkonto eĉ plie ne estus danĝera, ĝi estus estinta amiko. Sed neniu enloganto de la valo nun estas tie ĉi. Winnetou eraris.“

Per tio la afero estis finigata, kiu pli poste estiĝis tiel fatale al ni, almenaŭ al unu el ni. Post mallonga tempo ni ekvidis necertan lumbrileton, la ŝajnon de la lampoj, kiu iĝis tra la tendokovriloj. Ni kvar estis antaŭe.

„Atendu la aliajn!“ Old Death diris al Sandia.

„Ili stariĝu antaŭ la tendoj, ĝis ni estos informitaj *Señor Uhlmann*:on.“

La hufofrapoj de niaj ĉevaloj certe estis aŭdita en la tendoj, tamen la kovriloj ne estis disŝirataj.

„Kunvenu enen, *Sir!*“ la maljunulo diris al mi. „Ni vidu, kian plezuron kaj surprizon ni kaŭzos.“

Oni povis vidi de ekstere, je kiu loko estis la eniro. Old Death enpaŝis unue.

„Jen ili jam estas!“ vokis voĉo. „Ne lasu ilin eniri!“

Jam dum tiuj vortoj krakis pafo. Mi vidis, kiel la *scout* konvulsiĝis per ambaŭ manoj al la framo de la kovrilo, kaj vidis samtempe plurajn pafilojn direktigite al la eniro. La maljunulo ne plu povis resti starante; li falis surteren.

„Mia antaŭscio — mia frato — pardono — en la selo!“ li ĝemis.

„*Mr. Uhlmann*, pro la volo de Dio, ne pafu!“ mi ekkriis. „Ni estas amikoj, germanoj! Via bopatro kaj bofrato estas ĉe ni. Ni venas pro savigi Vin antaŭ la intencita atako.“

„Dio Sinjoro! Germanoj!“ oni respondis interne. „Ĉu tio eblas?“

„Jes, ne pafu! Lasu min eniri, almenaŭ nur min!“

„Nu venu! Sed neniu krome!“

Mi enpaŝis. Tie staris boneble pli ol dudek viroj, ĉiuj armitaj per pafiloj. Tri lumiloj brilis pendante de la tendoplafono. Juna viro paŝis renkonte al mi. Flanke de li staris homo kun aĉiĝinta aspekto.

„Ĉu tiu estis ĉe ili, Harton?“ la pli juna demandis lin.

„Ne, *Sir!*“

„Sensencaĵo!“ mi vokis. „Ne longe ekzameni! Ni estas amikoj, sed la malamikoj estas malantaŭ ni. Ili povas veni ĉiun momenton. Vi nomis tiun viron Harton. Ĉu estas tiu, kiun la ĉimaroj kuntiris ekde hieraŭ?“

„Jes, li povis fuĝi de ili. Li enpaŝis tie ĉi nur du minutojn antaŭe.“

„Do Vi kaŝiris preter ni, *Mr. Harton*? Unu el ni vidis Vin, sed ni aliaj bedaŭrinde ne kredis tion. Kiu pafis?“

„Mi“, unu el la viroj deklaris.

„Dank’ al Dio!“ mi trankviliĝis, ĉar mi jam estis pensinta, ke unu frato mortpafis la alian. „Vi mortigis senkulpulon, viron, al kiu Vi ŝuldas Vian savigon!“

Tiam envenis la du Lange:oj, kun ili Sandia, la *gambusino*. Ili ne plu povis restiĝi ekstere. Estis ĥaosa, laŭtega ĝojo. El la ĉirkaŭaj dometoj alvenis la ceteraj enloĝantoj de la valo. Mi devis laŭte voki pro krei trankvilon.

Old Death estis morta, rekte pafita tra la koro. La negro Hektor enportis lian korpon kaj kuŝigis ĝin per mallaŭta plendo meze inter nin. Du virinoj estis venintaj el alia sekcio de la tendo. Unu surhavis la vestaĵojn de malgranda knabo. Estis la vart-istino. La alia premiĝis inter la brakojn de sia patro kaj sia frato.

Sub tiuj cirkonstancoj mi povis nun fidi nur pri mi mem kaj Winnetou. Mi demandis Harton:on, kiel li sukcesis fuĝi.

„Mi erarigis la ĉimarojn kaj kondukis ilin supren en la arbaron malantaŭ la valo“, li deklaris al mi. „Tie ili restiĝis, dum la ĉefo eliris pro esplorado, kaj kiam ĝi estis malheliĝinta, ili ekiris. Ili forlasis iliajn ĉevalojn kaj kelkajn gardistojn. Ĉe ili mi kuŝis sur la teron kun ligitaj manoj kaj piedoj. Mi sukcesis liberigi la manojn, kaj tiam ankaŭ la piedojn. Nun mi kaŝe foriĝis, rapide al la sekreta ŝtuparo kaj malsupren en la valon. Mi iris preter Vi, kaj pensis, ke Vi estas malamiko, kuris tien ĉi, trovis la plejparton de la laboristoj kuniĝintaj tie ĉi, kaj anoncis la atakon al ili. La unua, kiu volis eniri tie ĉi, estis mortpafata.“

„Damnendel!“ mi vokis. „Tio estas malfeliĉa afero. — Kaj laŭ tio, kion Vi diras, la fiuloj povas esti tie ĉi ĉiun momenton. Oni establu ordon.“

Mi turniĝis al Uhlmann mem, la viro, kiu estis starinta flanke de Harton, kiam mi envenis. Haste mi informis lin pri la situacio, kaj per lia helpo la necesaj pretigoj estis faritaj post malmultaj minutoj. Dum tio oni obediĝis laŭ la ordonoj de Winnetou, kiu havis la plej grandan sperton pri tiuj aferoj. Niaj ĉevaloj estis kondukataj pli enen en la valon. La apaĉoj stariĝis malantaŭ la tendo, kaj al ili la laboristoj de Uhlmann. La korpo de Old Death estis reelportata. Oni ruliĝis bareleton kun petrolo al la rivereto. Oni forigis la kovrilon de la barelo, kaj ĉestariĝis viron, kiu ricevis la ordonon post certigita alvoko verŝi botelon da benzeno en la petrolon kaj bruligi la fluaĵon. Ĵus kiam la amaso brulos, li puŝu la barelon en la rivereton. La flamanta nafto estu forfluigata kun la akvo, kaj tiel lumigu la tutan valon.

Tiel nun pretstaris pli ol kvindek viroj pro akcepti la malamikojn, al kiuj ni egalas per nombro, sed ege plie fortis per armiloj. Kelkaj ruzaj kaj spertaj laboristoj estis sendataj al la eniro, pro anonci la alvenon de la malamikoj.

Je la malantaŭa kovrilo de la tendo ni lozigis la malsuprajn ringojn, pro ke oni povis en- kaj eliri tie. La virinoj estis igitaj en savon en la malantaŭo de la valo. Mi sidis kun Uhlmann, Winnetou, Harton kaj la du Lange:oj sole en la tendo. Hektor estis restinta ĉe la apaĉoj. Ekde ni atendis, pasiĝis boneble dek minutoj. Tiam venis unu el la viroj, kiujn ni estis antaŭsendintaj. Li alkondukis du blankulojn, kiuj volis interparoli kun Uhlmann. Sed malantaŭ ili, li anoncis, estis estinta rimarkebla moviĝo, per kiu oni povis ekkoni, ke ankaŭ la aliaj estis alvenintaj. La du blankuloj estis enlasataj. Mi reeniĝis kun la Lange:oj, Winnetou kaj Harton en la flankan sekcion de la tendo.

Tiam mi vidis — Gibson:on enveni kun William Ohlert. Ili estis amikece bonvenigitaj kaj invitataj sidiĝi. Gibson nomiĝis Gavilano, kaj ŝajniĝis al Uhlmann esti geografo, kiu volis viziti tiun montaron kun sia samfakulo. Li estus stariĝinta sian tendon en la proksimon, kaj tiam unu Harton, *gambusino*, estus veninta al li. De li li estus eksciiginta, ke oni povus trovi tie ĉi bonan loĝejon. Lia kunulo estus malsana, kaj tial li lasis sin konduki tien ĉi de Harton, pro peti al Uhlmann akcepti lin por tiu ĉi nokto.

Ĉu tio estis elpensinta saĝe aŭ infanmence, pri tio mi ne zorgis. Mi elpaŝis el mia kaŝejo; Harton sekvis min. Ĉe la ekvido al ni Gibson ekrektiĝis. Li fiksrigardis nin kun la esprimo de plej alta teruro.

„Ĉu ankaŭ malsanas la ĉimaroj, kiuj venas post Vi, *Mr. Gibson*?“ mi demandis. „William Ohlert ne nur restos tie ĉi, sed li eĉ iros kun mi. Kaj Vin mi ankaŭ kunprenos.“

Ohlert sidis tie, kiel ĉiam apatie. Sed Gibson sin rapide reregis.

„Fiulo!“ li kriis al mi. „Ĉu vi fisekvas honestajn homojn eĉ tien ĉi? Mi volas —“

„Silentu!“ mi interrompis lin. „Vi estas mia kaptito!“

„Ne jam!“ li vokegis furioze. „Unue prenu tion!“

Gibson estis havanta sian pafilon en la manon, kaj resvingis pro bato per la tenilo. Mi ekprenis lian brakon. Dum tio li turniĝis flanken, la tenilo rapide malsupreniĝis kaj trafis la kapon de Ohlert, kiu tuj kolapsis. En la neksta momento kelkaj laboristoj venis kure en la tendon de malantaŭe. Ili direktis iliajn pafilojn al Gibson.

„Ne pafu!“ mi vokis, ĉar mi ja volis havi lin vivante. Sed estis tro tarde. Unu krako, kaj li morte falis sur la teron, trafite tra la kapo.

„Ne ofendiĝu, *Sir*! Tiel estas la kutimoj ĉi lande!“ la pafinto diris.

Kvazaŭ la pafado estus estinta signo — kaj eble tio ankaŭ estis interkonsentigita de Gibson kaj siaj kunfiuloj —, eksonis sovaĝa indiana kriado ne tre fore de la tendo. Tiel malproksime la ĉimaroj kun la alianciĝintaj blankuloj do jam antaŭeniĝis.

Uhlmann hastis eksteren, la aliaj sekvis lin. Mi aŭdis lian voĉon. Krakis pafoj, homoj vokis kaj malbenis. Mi estis sole en la tendo kun Ohlert, kaj surgenuiĝis ĉe li pro ekzameni lin. Lia pulso ankoraŭ batis. Tio trankviligis min. Nun mi povis partopreni en la batalado.

Kiam mi elvenis, mi rimarkis, ke la interbatalo jam estis decidita. La valo estis lumigita taghele per la bruligita nafto en la rivereto. La kontraŭuloj estis akceptitaj alimaniere, kiel ili estis pensintaj. La plej multaj el ili kuŝis morte aŭ vundite sur la tero. La aliaj fuĝis, sekvate de la venkintoj, al la elirejo. Tie kaj tie ankoraŭ unuopa atakinto batalis kontraŭ du aŭ tri el la homoj de Uhlmann, sen espero pri sukceso.

Uhlmann mem staris flanke de la tendo kaj lanĉis unu kuglon post la alia tien, kie li vidis celon. Mi atentigis lin, ke ĝi estis pli utile sendi trupon de siaj homoj kun Harton kiel trupestro al la sekreta supreniro kaj la ĉevaloj de la malamikoj, pro akiri ilin. Tie oni povis ankaŭ akcepti tiujn, kiuj eble sukcesis fuĝi el la valo. Li akceptis tiun konsilon, kaj tuj ekagis laŭ ĝi.

Apenaŭ tri minutoj estis pasintaj post la unua pafado, kaj jam la situacio estis klarigita.

Ŝate mi forsilentas la okazigojn. Bildojn, per kiu la koro ofendiĝas, oni ne imagigu, nek per la peniko, nek per la plumskribilo. La vera kristaneco malpermesas eĉ al la venkinto delekti pri sia triumfo.

La viroj de Uhlmann facile estis sukcesintaj forpreni la ĉevalojn. Dum la nokto ili restis ĉe la akiritaj bestoj. Nur Harton revenis.

Li ne jam havis ideon, kiu estis la sola mortulo de nia partio de la hodiaŭa vespero. Mi iris kun li eksteren en la valon, kie lumis kelkaj rapide ekbruligintaj fajroj, kaj paŝis kun li al malhela loko. Tie ni sidiĝis, kaj mi sciigis lin, kion li devis ekscii.

Fred Harton ploris kiel infano. Li ĉiam estis aminta sian fraton malgraŭ ĉio, jam delonge estis pardoninta ĉion de li, kaj vere estis estiĝinta *gambusino* per la espero, eble iam renkonti lin ie aŭ tie dum la laborado en tiu profesio. Li petis min rakonti ĉion, de mia unua renkonto kun la *scout* ĝis al la lasta momento, en kiu la kuglo, kiu ne estis celinta al li, trafis la pentofaranton. Li volis aŭdi ĉiun vorton, kiu estis ŝanĝita inter li kaj mi, kaj kiam ni reeniris al la tendo post pli ol unu horo pro vidi al la mortulo, li petis min akcepti lin en mia koron kiel lian bedaŭrindan fraton.

Je la sekva mateno la selo de Old Death estis alportata. Nur li kaj mi detranĉis la subŝtofon.

Ni trovis paperujon. Ĝi estis maldika, sed enhavoriĉa. La ekmortinto postlasis al sia frato ĉekojn pri altaj monsumoj kaj, kio estis la ĉefaĵo, la detalan priskribon kaj la akribre faritan mapon de loko en la Sonora, kie Old Death estis trovinta multepromesan *bonanza*.n. Ekde tiu momento Fred Harton estis riĉega viro. —

Kiujn celojn Gibson fakte provis atingi per William Ohlert, ne estis ekscieble. Eĉ lia fratino Felisa Perillo, al kiu lia vojaĝo verŝajne finfine celis, certe ne estus povinta klarigi tion. Mi trovis je li ĉiujn dekontigintajn sumojn kiel bankobiletoj, sed fakte malpligita per tio, kion li estis elspezinta por la vojaĝo.

Ohlert ja vivis, sed longe ne vekis el sia senkonscio. Estis ekspektinda, ke mi devis resti tie pli longan tempon pro tio. Fakte tio ne estis malagraba al mi. Tiel mi povis rilaksi post la penegado, kaj konatiĝi al la vivo kaj farado en *bonanza* detale, ĝis la stato de Ohlert permesis transdoni lin al Chihuahua en la flegantajn manojn de kapabla kuracisto.

Old Death estis enteriganta. Ni starigis pro li tombomonumenton kun kruco el arĝentohava minaĵo. Lia frato maldungiĝis el la servo al Uhlmann, pro unue rilaksi post la penegoj de sia vivo kiel *gambusino* en Chihuahua kelkan tempon.

Granda estis la ĝojo, kiun Uhlmann kaj lia edzino sentis pri la alveno de iliaj du parenuloj. Ili estis ĉarmajn, gastamantajn homojn, pri kiuj tiu ĝojo estis malenviinda. Fred Harton petis min akompani lin al la *bonanza* en la Sonora. Mi ne povis decidinte respondi al li, kaj atendigis lin ĝis la alveno en Chihuahua. Winnetou decidis rajdi hejmen kun siaj dek apaĉoj, kiuj estis riĉe donacite de Uhlmann, ĉar post la finigo de la batalo kontraŭ la komanĉoj nun atendis lin la interkonsiladoj, kiuj devis certigi la pacon inter la du triboj. Ankaŭ la negro Hektor forvojaĝis. Ĉu li plenumigis sian ordonon, kaj povis reveni al *Señor* Cortesio, mi neniam poste eksciis. —

Kaj du monatojn poste mi sidis ĉe la bona religio Benito de la ordeno *El Bueno Pastor* en Chihuahua. Al li, la fama kuracisto de la nordaj provincoj, mi estis portinta mian malsanulon, kaj li estis sukcesinta plene resanigi lin. Mi diras plene, ĉar kvazaŭ miraklo kune kun la korpa saniĝo ankaŭ la psika reestiĝis. Ĝi estis, kvazaŭ la malfeliĉa

mania imago en Ohlert ke li devis esti freneza poeto, estis mortbatita per la tenilbato de Gibson. Li estis vigle kaj bonfarte, intertempe eĉ sprite, kaj sentis la neĉeeston de sia patro. Li ne jam sciis, ke mi estis atendanta mian ordoninton. Mi estis sendinta raporton pri la plenumigo de mia tasko, kaj ricevinta la respondon, ke la patro estis venonta mem pro hejmenigi sian filon. Intertempe mi estis petinta de *Mr. Josy Taylor* pri mia maldungo. Mi estis ekhavinta la emon, kaj de tago al tago ĝi estis plikreskinta en mi, ke mi volis vojaĝi kun Harton al la Sonora.

Fred Harton venis ĉiun tagon pro viziti nin kaj la bonkoran ekleziulon. Li estis haviginta vere kortuŝan ŝaton pri mi, kaj speciale ĝojis pri la resaniĝo de nia malsanulo.

Fakte estis okazinta vera miraklo. Ohlert ne plu volis aŭdi la vorton ‚poeto‘. Li povis memori ĉiun horon de sia vivo, sed la tempo ekde lia fuĝo kun Gibson ĝis lia vekigiĝo en la *bonanza* estis tute malplena folio en lia memoro.

Hodiaŭ nin nun residis kune: la ekleziulo, Ohlert, Harton kaj mi. Ni rakontis pri niaj spertoj kaj esperoj. Tiam la servisto frapis sur la pordon, malfermis kaj enirigis viron, kiu igis Ohlert:on krii per ĝojo per sia apero Kian aflikton kaj kian zorgadon li estis kaŭzinta al la patro, tio klariĝis al li nur nun. Plorante li ĉirkaŭbrakadis lin. Sed ni aliaj silente iris el la ĉambro.

Pli poste estis ebleco interparoli kaj rakonti ĉion. Patro kaj filo ĉesidis, unu tenante la manon de la alia. Ohlert alportis al mi la petitan maldungon kaj la reston de la salajro kiu li ŝuldis al mi, al kiu la bankisto plidonis propran kaj altan apartan pagon. Nun mi havis pli ol sufiĉaj rimedoj pro finfine plenumi mian praan intencon iri hejmen. Sed mi vidis novan aventuron ekaperi, per kio la pensado pri mia hejmlando ĉiam pli paliĝis. Mi deklaris al Harton mian konsenton akompani lin. Nun ĝi estiĝis tiel, kiel tiel ofte pli antaŭe dum miaj vojaĝoj: mi restis pli longe for de la hejmo ol mi pli antaŭe estis intencinta. La priskribo de miaj travivaĵoj kun Fred Harton en la Sonora sed ne nun skribendas tie ĉi. Nur dirindas, ke ni feliĉis, kvankam tra grandaj penoj kaj danĝeroj, trovi la *bonanza:n*, kiu estis priskribita de Old Death. Plej ŝate estus estinta tutcerte al ni, se iu tria estus povinta partopreni en nia feliĉo. Kaj per tiu tria mi celas al nenio alia — sed al la maljuna *scout*.